

LA VERDA LUPEO FENIKSO



N-ro 78 | 1989-2 Aŭgusto | 21-a jaro

Informilo de Esperanto-Ligo Filatelista
Faka asocio en UEA

Volapükaklub valemik nedänik

BALIF MEKOM VALÜDI.



Söle ~~Tisöle~~ palestimöl J. G. M. Reynders,

Hugo de Groot-straat,

in Delft



FRANCO

12-2-1900.

Filatela juvelo el la volapuka movado el la arkivo de nia J.Amouroux

Informilo de ELF/AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj

Prezidanto-Kasisto: I.Paulsson, Skyttehoimsvägen 29
S-171 44 Solna
Stampobanko: W.Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau
Kotizo 1989: 60 sv. kronoj aŭ 10 us. dolaroj aŭ 20 IRK
(Ne plu eblas akcepti poŝtmarkojn!)
Redakcio ĉe: R. Burmeister, W.-Firl-Str. 30
Karl-Marx-Stadt, DDR-9047

LVL 77 estis duobla!

Nia amiko I. Paulson atentigis, ke nia LVL 77 havis duoblan amplekson pro ĝiaj 24 paĝoj. Normala amplekso estas 12 paĝoj.

Bonvenon!

Lee Jung-Kee (sekr. de KEA), CPO 4258, Seul, Koreio
Edeltraud Bichler, Pf. 16, D-8120 Weilheim 1013
Bertil Löfqvist, Rövar Liljas väg. 8, S-621 48 Visby
Kjell Randehed, Ragnvallg. 30 C, S-252 62 Helsingborg

Changsha-a Esperanto Filatelista Ligo

Celoj estas: Esperanton propagandi kaj disvastigi inter filatelistoj, intereson veki pri filatelio inter esperantistoj. Oni serĉas ĉies kunlaboron kaj intencas fondi "Intenacian Negocan Centron pri Filatelaj Tutaĵoj". Peru nian informon al viaj filatelaj organizaĵoj. Jen la adreso:
Changsha-a Esperanto Filatelista Ligo, Lian sheng jie 2, TJ-410005 Changsha, Hunan, Ĉinio.

Nova adresaro?

Nia I. Paulsson volonte aperigus novan adresaron. Sed li prokrastas la aperigon, ĉar multaj niaj klubanoj tute ne sciigis, kion ili kolektas. Se vi tion ankoraŭ ne faris, bv. faru tion.

Dankon al W. Heimlich

Dank'al la bona laboro de W. Heimlich, estro de nia stampobanko estas por s-ro Paulsson multe pli facile financi la tre altajn pres- kaj ekspedkostojn de nia informilo. Jam plurfoje s-ro Heimlich el la konto de la stampobanko subvenciis nian informilon.

Stampokatalogo 1989 aperis

Komence de julio 1989 la mendintoj de la nova katalogo ĝin ricevis. Kun agrabla surprizo: la tekstoparton akompanis kompleta bildparto kaj kompleta valorpoenta tabulo (do: prezlisto). Iom poste senpage sekvis novordigita parto "Afrankostampoj". La kvar partoj kune kostas 18 IRK, aŭ gmk 25.-. Pro la lasta drasta altigo de la afrankokostoj en FRG aldoniĝas sumo por la afranko:

FRG kaj GDR:	gmk 1.50
Eksterlando:	gmk 2.00
Aerpoŝte al:	
Usono, Kanado, Israelo	gmk 6.00
Sudameriko, malproksima oriento	gmk 7.50
Aŭstralio:	gmk 9.00

Komence de 1990 nia kluba amiko R. Hirsch intencas eldoni aldonajn foliojn kun korektoj kaj novaĵoj. Jam s-ro Hirsch komencis kompili aldonajn partojn kun la temoj: Esperantaj poŝtmarkoj, Esperantaj tutaĵoj, Esperantaj glumarkoj. Pri la aperdato kaj prezoj ni informos ĝustatempe. Nia kluba amiko Richard Hirsch meritas grandan laŭdon pro la bonega rezulto de lia longedaŭra preparlaboro. Koran dankon al li pro la farita laboro!

P.S. La Katalogon bv. mendi kaj pagi ĉe Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld.

Ekspozicioj

Turku - Finnlando

Samideanino Anna-Liisa Ali-Simola, gvidantino de la laborgrupo Foira Rondo en Turku preparis ekspozicion kaj skribis: En Turku okazis la 11an ĝis la 14a de novembro la AVITE-88-foiro. Esperanto-societo de Turku havis standon kun kvar tabuloj pri la E-filatelio. Ni gratulas pro la bonega filatela aranĝo de la folioj kaj kore dankas pro la alsenditaj koloraj fotoj.

***

Solingen - FRG

Kore ni gratulas al nia R. Hirsch pro akiro de la rango Vermejlo (Vermeil). Li partoprenis filatelan ekspozicion en Solingen en marto 1989.

***

Cui Haijing en Urumĉji

Okaze de la 70-jara ĉina movado de la 4-a de majo okazis la 4-a filatela ekspozicio de Xinjiang-Universitato fine de aprilo 1989. Nia kluba amiko Cui Haijing prezentis sian filatelan ekspoziciaĵon

kun 96 folioj sub la temo: "Paca kaj amikeca lingvo — Esperanto en poŝto". Gratulon al vi! Bv. skribi ĉu vi sukcesis en la julia ekspozicio!

***

JUNIORPHEX'89 en Koreio

18-an ĝis 27-an de majo 1989 okazis en la poŝta muzeo en Seulo, Korea Respubliko, la 3-a tutlanda filatelia ekspozicio de infanoj. La naŭ-jara knabino Hyo-Jong, filino de s-ro Lee Jung-Kee (sekretario de KEA kaj nia kluba amiko ekde 1988) tie prezentis sian kolekton pri Esperantaj poŝtmarkoj. Dankon pro la alsendita ekspo-katalogo kaj pro la informilo "Verda voĉo" n-ro 4, oficiala organo de KEJ. Gratulon al Kee Hyo-Jong, ni deziras sukcesan kolektadon!

Aliaj pri ni

La Philatélie Française

En la februara numero de 1989 aperis denove abundo da sciigoj pri "Esperanto kaj filatelio" sur du paĝoj. El la plumo de nia J. Amouroux i.a. ni trovas interesajn bildojn pri filatelaĵoj koncerne Grabowski kaj la gazeton TRA LA FILATELIO el la jaro 1909! Dankon al Amouroux pro lia ekstermovade efika agado kaj pro la senditaj informoj.

sammler express 4'89

Monata filatela gazeto en GDR. En numero 4/89 mi trovis tutpaĝan artikolon el la plumo de d-ro Detlev Blanke pri la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, pri la Esperanto-filatela agado kaj pri nia ELF-AREK.

Samnumere mi trovis liston pri la en GDR aperintaj tutaĵoj de la jaro 1988. Niaj Esperanto-tutaĵoj estas registritaj sub la numeroj:

22. Tago de la E-libro 1987
23. IFER 88
25. Arta semajno 88
42. Grabowski

***

Bulgara Esperantisto Feb. 89

G. Kirov verkis artikoleton pri "La temo Esperanto en filatelo" kaj en ĝi listigas la ĝis nun aperintajn 7 bulgarajn Esperantajn poŝtmarkojn. Dua artikolo el la plumo de N. Nikolov raportas pri okazinta "Konferenco de Kolektantoj" en septembro 1988. Laŭ N.N. la Sekcio de Kolektantoj estas unu el la aktivaj sekcioj de BEA. La

novelektita sekcia estraro kun prezidantino s-ino Svetlana Stratieva promesis aktive labori kaj plenumi la decidojn de la konferenco.

Niaj tutaĵoj

E-pk GDR 59

Poŝta karto (10 pfenigoj) kun verda surpreso:
Ludwig Renn/1889-1979/Esperantisto/Komandanto de la Thälmann-Bataliono/Stabestro de IX-a internacia brigado/Prezidanto de la Internacia Asocio/de Revoluciaj/Esperanto-verkistoj.

***

E-pk GDR 60

Poŝtaj kartoj (10 kaj 25 pfenigoj) kun nigra surpreso: Jarmeza /Esperanto-/Semajnfino/23.-25.6.89/Leipzig-Markkleeberg Eldon-kvanto: 3000/300
Ili havebias en la stampobanko aŭ ĉe nia kluba amiko Beau.

***

Bild-pk de SU kun surpreso

12-18 de oktobro 1989 en Drogobiĉ okazos int. renkontiĝo de E-istoj. La loka Esperanto-klubo "Kolombo de paco" i.a. per surpresita bpk. varbas por tiu aranĝo. La verda surpresita teksto: Drogobiĉ situas apud Verdaj Karpatoj... urbo de okcidenta Ukrainio... ktp." La bpk. havas nominalon de 3 kopekoj. Adreso: Vasil Stanoviĉ, prez. de E-klubo, 293720 Drogobiĉ, Lvov obl. PK20, Sovetio.

E-bildkartoj

abundas. Aparte interesaj estas tiuj el la jaroj antaŭ 1914. Tiuj prezentas al ni multajn faktojn el la historio de nia movado. Mi scias, ke nia Goslinga posedas grandan kolekton. Mi havas nur tri-kvar el tiuj jaroj. Sed nun mi ricevis de Hirsch kopiojn pri pluraj. Du el ili mi hodiaŭ prezentas al vi: 1909 aŭ pli frue D-ro Kleider en la germana urbeto Aue eldonis cepelinajn bildkartojn, kiuj montras cepelinon Esperanto super montara lago. Interese , ke la idistoj trovis la ideon de fluganta cepelino por propagando taŭga, kaj aperigis ankaŭ cepelinan bildkarton. Tiu cepelino montras la surskribon IDO, sed ankaŭ ĝi flugas super montara lago... Eldonis la "Esp.-grupo Progreso" Zürich. Kopio montras poŝtan stampon de 18.VI.09 de Zürich. Dankon al nia kluba amiko Hirsch, kiu sendis la kopiojn!

Tutaĵoj - Pollando

Kiel informis nia Stefan Bielak, la pola ICEM-tutaĵo ekzistas ne

nur kun 5-zlota Kochanowskiego-pm, sed ankaŭ sur pk kun 5-zlota pm montranta la floron *Clematis macropetala*. Al mi mankas ambaŭ tutaĵoj. La ICEM-renkonto okazis 1987 antaŭ la UK.

Simon-demando pri tutaĵoj

"... via raporto pri novaj tutaĵoj konfuzas min. Kiuj estas oficialaj kaj kiuj private aranĝitaj? Estas necese kompreni la diferencon. La tutaĵoj de Pollando, GDR kaj V. Tirnovo estas ŝajne private aranĝitaj, kvankam kelkaj estis presitaj kun permeso de la poŝto, dum aliaj tute private surpresitaj. Ĉu vi povas klarigi tion?..."
Nia amiko Simon proponis, listigi nur poŝte eldonitajn en katalogo. Mi persone povas paroli nur pri la E-tutaĵoj en GDR. Ekzistas tutaĵ-katalogo pri GDR-aĵoj, eldonita de Filatela Asocio de GDR. Tie aperas niaj E-tutaĵoj en la kategorio C, en la kategorio B troviĝas tutaĵoj eldonitaj de la Filatela Asocio kun speciale surpresita normala pm, en kategorio A ĉiuj poŝte eldonitaj tutaĵoj. En kat. C aperas ĉiujare 50/60 tutaĵoj.
Laŭ mia opinio estus bone, se tutaĵ-katalogo informus pri ĉiuj tutaĵoj konatiĝintaj, certe, sub diversaj kategorioj. Jam tial, ĉar ekz. iuj FRG-tutaĵoj (E-kgr. Göttingen 1949) sur la filatela merkato en FRG havas fantazie altajn prezojn, kvankam ili estis private surpresitaj kaj nenie katalogitaj.

Niaj stampoj

Banja Luka 1987

En aprilo 1989 nia R. Hirsch malkovris stampon kun la dato de 19.6.1987 el Banja Luka (YU), kiu posedas la Esperantan tekton: 22. Kongreso de Jugoslavia Esperanto-Ligo. En la mezo de la ronda stampo troviĝas nia jubilea simbolo kun urba blazono. Mi tre dubas pri ĝia poŝteco pro la gumstampa aspekto.

***

Zagreb 1988



Nia R. Hirsch trovis duan al ni nekonatan jugoslavan stampon: unuatagan stampon el Zagreb kun la dato: 14.7.1988. En la mezo ĝi posedas grandan E kun kvinpinta stelo kaj la tekston: 100 OBLJETNICA ESPERANTA. En la ekstera rondo legeblas: PRVI DAN 41101 ZAGREB - 14.7.1988.
La stampo troviĝas sur oficiala utk (PTT-12/88) kun la 600-dinara E-pm.

Dankon al nia klubano R. Hirsch pro la sciigoj. Estus por mi interese scii, ĉu nur nia R. Hirsch posedas la stampojn de Banja Luka kaj Zagreb. La katalogajn numerojn vi trovos en nia nova stampokatalogo 89.

***

Norrköping 1989

Unue mi direktas koran dankon en via nomo al nia Anna-Greta Strönne en Malmö pro la modelaj sciigoj lige kun ĉi nova sveda stampo. En Norrköping okazis 21an ĝis 23a de aprilo 1989 la sveda E-kongreso. La tiea loka E-klubo samtempe festis sian 60-jaran jubileon. Niaj geamikoj Strönne, Lindström kaj Paulsson zorgis pri memoriga stampo. La stampo tekstas: NORRKöPING - SVEDA ESPERANTOKONGRESO. La dato: 22.4.1989. En la mezo de la stampo nia jubilea simbolo super rokĉizaĵo. Tiaj troviĝas tra tuta Svedujo sur ŝtondeklivoj kaj rokplatoj, speciale ĉe la marbordoj kaj rivereifluoj kaj estas famaj postsignoj de la vikingoj. Apud Norrköping troviĝas tuta kampo da ŝtonoj kaj rokoj kun tiuj ĉizajoj, kiun ĉi-jare "popola ŝtormo" savis antaŭ pereo, ĉar estis planita nova aŭtostrato tra tiu ĉi naturprotektita kampego.
Lige kun la kongreso aperis ankaŭ bildpoŝtkarto kun E-teksto kaj tre bela glumarko.

***

Stampo pri Joseph Evrot

29an de aprilo 1989 funkciis en la festo-salono de la liceo en la franca urbeto Chambery portempa poŝtoficejo kaj uzis Esperantan specialan ilustritan poŝtstampilon kiu montras portreton de Evrot kun la teksto: "Joseph Evrot - Pionnier de l'Esperanto en Savoie". La stampo estis prilaborita de la Poŝta Administrado laŭ Evrot-portreto desegnita de Gysleine, filino de Raymond Boré. Evrot (1859-1920) estis la unua prezidanto de la loka E-grupo. Li eklernis Esperanton en 1902 kaj jam en februaro 1904 aperis lia unua traduko "Advokato Patelin" ĉe Hachette. Por la gazeto Esperanto li recenzis Esperantajn verkojn sub la pseŭdonimo "Verto", anagramo de lia familia nomo. Li estis membro de la estraro de SFPE kaj ankaŭ de la Lingva Komitato. En Bourg-en-Bresse, Limoges kaj Chambery li gvidis kursojn, kreis kaj prezidis Esperanto-grupon.
La urba Filatela Klubo eldonis memorigajn kartojn kaj kovertojn lige kun la stampo.
Dankon al s-roj Amouroux kaj Legris pro la alsendo de fotokopiita teksto pri Evrot el "Franca Esperantisto", marto 1989.

***

HU 110

Nia kluba amiko Stefano Fekete kaj mia samurbano Zeidler sendis al mi el la hungara Tata salutojn el la 25A LANDA FERVOJISTA ESPERANTISTA RENKONTIĜO. La ronda Esperanta stampo portas la daton 1989.07.01. Informoj pri evtl. memorigaj kartoj aŭ kov. ne alvenis. Dankon al nia Fekete!

***

PL 134

Nia kluba amiko Stefan Bielak informis per dato de 2.07.89: 15-20.VII.1989 okazos en la urbo Białystok la 25-a Tutpollanda Esperanto-kongreso.
Poŝtoficejo Białystok 1 uzis en la 15-a de julio 1989 stampilon kun la teskto: XXV POLSKI KONGRES ESPERANTA, t.e. XXV-a POLA E-KONGRESO. Dankon pro tiu informo!

***

Filatela Espozicio en Nanchang

Ding Shihui kaj Cao Xionglin informis pri tiu ĉi stampo. Dankon! Temas pri Esperanta-ĉina ornama senfina maŝinstampo kun la teksto: FILATELA EKSPOZICIO/Memore al al 40-jariĝo de/liberigo de Nanchang. La dulingva datstampo de Nanchang notas la urbonomon ideograme kaj latinlitere kaj ĝi portas la daton: 1989.5.22.2. Ekzistas ornama koverto (ne-Esperanta) kiu ricevis la surpreson: "Memore al la 40-jariĝo de liberigo de Nanchang/ Filatela Ekspozicio".
Samideano Cao Xinglin partoprenis en la filatela ekspozicio per ekspozaĵo pri Esperanto. Gratulon!

***

40 jaroj de la liberigo de Maanshan

Dankon al samideano Zhang Linrui, kiu bonvolis sendi ĝin pere de Ĉin Kajĝi al mi. La stampo posedas daton 1989-4-24. En la supra rondo estas ideogramoj, eĥ la malsupra la Esperanta teksto: LA 40 JAROJ DE LA LIBERIGO DE MAANSHAN. En la mezo pozas kvinpinta radianta stelo. Desegnis ĝin Linrui. La PTO eldonis neesperantan memorkoverton (numero:M.J. 89-2).

***

40 jaroj de la liberigo de Changshu

Ankaŭ tiu ĉi atingis min pere de Ĉin Kajĝi, sendita de Linrui, kiu desegnis ĝin. En la mezo de la ronda stampo pompas 5-petala floro. En la supra rondo ĉina teksto, malsupre la Esperanta teksto (vidu supre). Sub la floro la datoj, kaj mi trovis du datojn:

A: 1989-4-25

B: 1989-4-27

La PTO de Changshu eldonis Esperantan memorkoverton (JF-10). Desegnis ĝin: Linrui. Dankon ankaŭ al Lu Chengzhi kaj al Ding Shihui pro la senditaj informoj lige kun ĝi!

***

Stampo el Ninghai

Shen Minglun de *Ningbo Ribao* (gazeto en la urbo Zhejiang) sendis al mi salutkarton el la urbo Ninghai. La poŝta Esperanta stampo montras la daton 1989-5-4 (majo) kaj posedas la Esperantan tekston: 70 JAROJ DE LA MOVADO JE LA 4A DE MAJO. Desegnaĵo en ĝi montras brulantan torĉon. Temas pri junulara revolucia movado okazinta en la jaro 1919. La desegnisto de tiu E-stampo estas s-ro Chen Minggang kiu jam desegnis ĈIN 49 kaj 35A (fenestro kaj libro). Mezuro: 28. Koran dankon al Shen Minglun, ankaŭ pro la sekva informo.

***

Stampo pri la Rata Festo

Atingis min dua salutkarto de Shen Minglun kun la dato: 1989-5-3 (majo) en la Esperanta stampo. Tiu posedas la tekston: La 2-A KUTUAR [verŝ. kultura] KAJ RATA FESTO DE NINGBO-A JUNULARO. La stampo posedas diametron de 32mm kaj ĝi montras floron. Indikon pri urbo mi ne trovis.

***

Ne RATA festo sed ARTA festo en Ningbo

Fine de junio 1989 nia Ĉin Kajĝi skribis al mi: «Dum la 3-a ĝis 23-a de majo okazis en Ningbo "La 2-a Kultura kaj Arta Festo de Ningbo-a Junularo" kaj por celebri ĉi-tiun feston la Ningbo-a Poŝtmarka Kompanio emisiis E.UTK kun E-stampo. Ilin desegnis Qian Guoqi. Kamelio sur la E-stampo estas urba floro de Ningbo.

A. En la inaŭgura tago de la festo (1989.5.3) oni oficiale uzis E-stampon kun dato 1989-5-3 (jaro-monato-tago), sed oni tuj trovis, ke en la Esperanta teksto estas eraroj.

B. En la ferma tago de la festo (1989.5.23) oni oficiale uzis alian korektitan E-stampon kun la dato: 1989 5.3-23.

Jen la diferencaj tekstoj kaj datoj:

A. LA 2-A KU<u>TUAR</u> KAJ <u>RA</u>TA FESTO...... 1989 5 3

B. LA 2-A KU<u>LTURA</u> KAJ <u>AR</u>TA FESTO...... 1989 5.3-23

S-ano Shen Minglun, kiu sukcese kuraĝigis tiean poŝtmarkan kompanion oficiale uzi la memorigajn E-stampojn informis pri supraj faktoj. Li, Zhang Linrui, kaj mi opinias, ke ĉi tiuj E-stampoj kun malsamaj datoj kaj kun E-tekstoj erara kaj ĝusta, povus esti

rigardataj du apartaj E-stampoj kun apartaj numeroj.>>.
Jes, tiel opinias ankaŭ mi. En la unua suplemento al nia nova stampo-katalogo 1989 ni notos tion. Dankon pro la detalaj informoj!

***

Denove malnova el JU!

Tuj post la finpoluro de nia nova stampokatalogo denove ni trovis ĝisdate nekonatan jugoslavan E-stampon el la jaro 1987. La surpresita poŝta stampo posedas la tekston: 100 GODINA JEZIKA ESPERANTA, 27.11.1987. -43 236 VIRJE. Dankon al la mastro de nia stampobanko, s-ro Werner Heimlich, kiu informis pri ĝi.

***

41a IFEF-Kongreso en HI

El Salou (Hispanio) atingis min, sendita de mia samurbano G. Zeidler, bela Esperanta poŝtkarto el la 41a IFEF-kongreso. La Esperanta poŝtstampo tekstas: 41-A KONGRESO FEF (?), SALOU, 13-19 MAJO 1989. Desegnaĵo en ĝi montras relojn kaj stelon. La stampokvalito bedaŭrinde tre fuŝa. Dankon ankaŭ al nia Germano Gimelli, kiu sendis karton al mi.

***

Nantong-a stampo nepoŝta



Nia Ĉin Kajĝi skribis al mi: <<... S-ano Sheng Suchu skribis, ke li ricevis oficialan respondon de Nantong-a Poŝtmarka Kompanio. En sia respondo, la Kompanio skribis, ke ĝi neniam uzis Esperantan poŝtstampon por la Centjara Jubileo de Esperanto. Do la E-stampo kun la nova numero 41 ne estas poŝta, ne estas oficiala, sed private farita. Estas dezirate, ke tiu ĉi E-stampo estu nuligita...>>.

Dankon al nia amiko, kompreneble ni nuligos pozicion 41. Estas dezirinde, ke vi esploru la poŝtecon de pluraj aliaj suspektaspektaj pozicioj (18, 21, 28, 37, 46, 60 k.a.).

***

Perfektaj nefilatelaĵoj el Interna Mongolio

Pere de nia Ĉin Kajĝi s-ro Linrui sendis al mi memorkoverton, eldonitan de la E-A de Interna Mongola Aŭtonoma Respubliko. La koverto posedas la tekston: LA 10 JAROJ DE IMEA kaj montras krome mapon pri tiu respubliko kun ĝia ĉefurbo Huhhot (Hohoto?). Stampo sur ĝi nuligas poŝtmarkon, sed la stampo ne estas poŝta. Ankaŭ ĝin eldonis IMEA, kun la dato: 1989.12.9 (dec.). Kvankam la tuto estas tre bela, ĝia filatela valoro estas nula.

***

Pli bone faris Hubei E-A

Ankaŭ Hubei E-A festis la 10-an datrevenon de la fondiĝo de Hubei E-A. Memore al tio Hubei E-A eldonis memorkoverton kaj memorstampon (nepoŝtan). La stampo montras terglobon kun E-stelo kaj tri flugantajn gruojn, tiel ankaŭ la memorkoverto. Kontraste al la IMEA-stampo normala datstampo de la urbo Tianxin nuligas la poŝtmarkon, estas sendita al Pekino kaj posedas alvenstampon. Do, filatele uzebla materialo, kvankam la stampo ne trovos lokon en katalogo.
Koran dankon al Ĉin Kajĝi pro la klarigoj.

Novaj glumarkoj

74A BRITA KONGRESO DE ESPERANTO
OKSFORDO, 4-7 majo 1990
Folio kun 12 memgluaj glm haveblas ĉe: (3 IRK) 74-a Brita E-kongreso, 37 Granville Court, GB-OX3 OHS Oxford.

***

20-A TERITORIA ESPERANTISTA PACRENKONTO, Szeged, 15.05.1988
FERVOJISTA ESPERANTO RENKONTO, Tata, 01.07.89
TENDUMA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ, Vacratot, 1988
ESPERANTO EN BRITUJO 1989 - Saluton el la kongresurbo Brighton
ESPERANTO EN HUNGARIO 1989
Tiuj ĉi glumarkoj, kaj certe aliaj, haveblas ĉe nia kluba amiko Vilmos Radnai, P.O.Box 86, H-2331 Dunaharaszti.

***

La redaktoro kore dankas pro ricevitaj informoj al niaj klubaj geamikoj sinjorino M. Boulton kaj al V. Radnai.

***

MEM-kalendareto

De V. Radnai atingis min MEM-kalendareto 1989 kun la 15-lingva slogano PER ESPERANTO POR LA PACO. Dankon!

***

Skolta poŝto

Nia kluba amiko Rutkowski sendis kseroksaĵon pri filatelaĵo el Bidgoŝto el la jaro 1962. La koverto posedas nepoŝtan apud-stampon en Esperanto: 1. REGIONA KUNVENO DE POLA SKOL-

TA ASOCIO 1962/POLLANDO. Videblas ankaŭ glumarko kun la teksto SKOLTA POŜTO 1962.
Lige kun tio ni memoru, ke ni disponas ankaŭ pri stampo de la XII-a Tutmonda Tendaro de Skolta Esperantista Ligo, kiu okazis 16-31 julio 1934 en Slovakujo. Partoprenis 85 skoltoj, inter ili 25 esperantistoj, el 9 landoj. Cetere EdE erare skribas pri "22-a tendaro".
SEL fondiĝis en la jaro 1918. La Ligo ankoraŭ daŭre aktivas por la oficialigo de Esperanto fare de la Skolta Movado. SEL hodiaŭ havas membrojn en ĉ. 40 landoj, eldonas LA SKOLTA MONDO. Dum internaciaj ĵamboreoj kaj kunvenoj SEL aranĝas proprajn kunvenojn, tendarojn kaj informejojn.

***

